

& Riĉ- kaj malriĉuloj:

< Rekante 16 el 30 batoj por strofo, entute 360 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Hugiĵn Gavloviĉ. El slovaka tradukis Magda Ŝaturov-Seppov (Slovaka antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de " Brsajokils kvdi", disdivido na strofoj kaj kunmeto na du poemoj.>

(#Melodio:

<:30> (

/dodo TiLa LaLa SoFa LaLa LaSo LaLa; dodo TiLa LaLa SoFa dodo doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: LaLaLa LaLa SoFa FaFa SoLa; LaLa LaLaSo FaSo La; LaLa dorere redo dododo Ti La a)

)12)+

(&Strofoj:

& La riĉulo havas monon, malriĉul' infanojn:

'1 Se vi estas malriĉulo kun infanoj nombraj, ; vian koron ne plenigu ajnaj zorgoj mondaj,

(: **Olavo reĝo luktas kontra ogroj ; Lias veloj el ruĝa silk' ; Drako kuras, remiloj ludas en ingoj.**)

'2 montru al idaro via bonon nur kaj amon, ; certe Dio benos ĝin kaj donos al ĝi panon.

'3 Dum riĉulo havas monon, malriĉul' infanojn, ; gento lia nombra havas, ve, malplenajn manojn.

'4 Tamen mono ne tre gravas, ĉar l' infanoj kreskos, ; zorgos mem pri la vivteno kaj la ĝojo restos.

'5 Por riĉuloj la infanoj estas nenecesaj, ; ili ja nur lernus vivi en ĝuoj maldecaj.

'6 Kaj la sperto - de sinjoroj grandaj plimultiĝo ; kazas kreskon de mizero kaj de afliktiĝo.)

& Ordonoj por malriĉuloj, libereco por sinjoroj:

'7 Aranean reton ŝiras granda muŝ' kuraĝe, ; sed muŝ' eta mortas ene senhelpe, malsaĝe.

'8 Aranea reto estas la mondaj ordonoj ; validantaj por la plebo, ne por grandsinjoroj.

'9 La riĉuloj malrespektas ilin ja senpune, ; sed nur provu malobei malriĉuloj dume!

'10 Pro fiago la plebano estas pendigita, ; sed riĉulo, kiu pekas, restas nepunita.

'11 Ne imitu malobee maljustajn sinjorojn, ; agu bone kaj ne rompu la saĝajn ordonojn.

'12 Eĉ se tiujn, kiuj pekas, la puno ne trafas, ; perdo de la honesteco punon ja egalas.)